# EKO 2021
## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013
2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj
Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-52 sendita el Budapeŝto la 28an de novembro

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

## 'Landa Parad'>progresegis – Azio ĝisdatigita por 2021

La jaro 2021 vidis dramecajn bonigojn en la agado de UEA subteni la Landan kaj Fakan agadon. Aldonitaj estas multaj bildoj kaj mapoj, la membronombroj aktualigitaj, signifa kresko en la raportado pri la aliĝintaj Fakaj Asocioj de UEA, kiuj kulminis en nova servo realigita unuafoje por Azio: Faka Kavalkado. En 2022 ni pretigos similajn prezentaĵojn por la pliaj regionoj kun signifa faka agado.

Por 2022 ni antaŭvidas pli modestajn bonigojn. Ni kreis novan servon de UEA, kiu plenumos plurajn funkciojn kaj efikigos la kolektadon de informoj. Ĝi donos unuafoje al Landaj Asocioj koncizan manieron pritaksi sian agadon (ene de unupaĝa taksilo), kaj doni aktualigajn informojn por <Landa Parad'> kaj la landa retejo de UEA.




La servo estas nomita **UTILA** - Universala Taksilo de Inda Landa Agado. Ĝi estas evoluo de la bonega projekto KODEJO, kiun fondis TEJO. UTILA disiros al la Landaj Asocioj en decembro 2021, por ke ili raportu pri sia agado en 2021.

Trovu la azian aktualigon de <Landa' Parad'> en la retejo <aktivulo.net> sub la rubriko 'Landa Agado'. Tio signifas, ke ses el la sep mondaj regionoj en la raportado estis ĝisdatigitaj ene de 2021. La sola manko estas la regiono MONA, pri kiu ni nun aktive laboras, cele al aperigo en januaro 2022, kiu do validos por la jaro 2022.

Per <Landa Parad'>, UEA plenumas je signife bona kaj daŭre evoluanta nivelo la siatempan tre limigitan proponon de la Jarlibro pri la Landa Agado.

## AMO 80 en Ĉinio – pliaj informoj

La seminario okazos en la Zamenhofa Tago mem, la 15a de decembro inter la 16.00 kaj 18.00 loka tempo, do ekde 22.00 CET kaj 23.00 UTC. La temo estas 'Esperanto, Kreivo, Disvolvo'. La seminario okazos pere de la ĉina servo *Tencent,* kun klopodoj

krome disponigi ĝin per *Zoom.* Ni jam sendis informojn pro AMO 79 kaj 81 kaj per tio la AMO-programo por 2021 venas al fino. Ĝi estos plene resumita per jam verkita artikolo por la januara numero de revuo *Esperanto*.

## Slovenio aktivas kaj invitas

Mi alkroĉas dulingvan invitilon al la solena kunsido de ES Ljubljana, kiu okazos rete vendredon, la 3-an de decembro 2021, je la 18-a horo. Oni festos la 100-jaran jubileon per mallonga programo. Gvidilojn por la partopreno vi trovos en la alkroĉaĵo aŭ per vizito al UEA eventa servo.

Ostoj Kristan, sekretario de SIEL

## Benino agadas inter virinaj rondoj

La NRO "Scio Sen Bariloj" (SSB) organizas kursojn en Kotonuo, Benino, kies nomo estas SEVI, ĉar temas pri SEminario por VIrinoj. Tiu seminario havas tri studcelojn: temas pri enkonduko al Esperanto, enkonduko al skribado kaj legado de la fonua lingvo kaj virina kapabligo al gvidaj roloj. Ekde 2015 tia plensemajna kurso jam okazis kvinfoje. Detaloj troviĝas sur la paĝo https://eo.wikipedia.org/wiki/Scio_Sen_Bariloj

## Universitata virtualeco en Ĉinio pro la pandemio

En novembro,2021 la virusa pandamio elrompiĝis en la bela drakurbo - Changzhou de Ĉinio. La aŭtoritatoj de eduka funkciado proklamis ĉesigon de ĉiuj kursoj kaj lecionoj en diversaj lernejoj. La lernantoj kaj instruistoj devis kvaranteni en sia hejmo. Universitatoj rigore enfermiĝis, kaj studentoj devis resti en sia internulejo por memstudado. En Jiangsu-a Teknologia Universitato ĵus aperis la E-kurso nedeviga funkcigita en oktobro, 2021. Ĝi renkontis la ĉesigan sorton.



En ĉi tiu semestro la Eo-kurso nedeviga estis ankoraŭ bonvenaj al studentoj. Oni facile atingis 100 personojn. La kurso daŭras 3 studhorojn en semajno kaj 32 studhorojn en semestro. 2 kreditpoentojn povas gajni la studento kiu trapasas la ekzamenon de la kurso. La kurso estas gvidita de s-ro Longarko Zhang Changsheng, prezidanto de Changzhou-a E-Asocio, kaj s-ro Rivero Zhang Changjiang kiel vic-instruisto. La kurso elektis la libron <Moderna Esperanto> kompilita de prof. Li Weilun kiel lernolibro .

Changzhou-a E-Asocio akomodiĝis al la situacio, kaj faris virtualajn lecionojn.

## Folifalo en poezia kunteksto

Amira Chun + Liven Dek + Petro Palivoda + Antero Ávila kune en unu kanto Folifala elegio: https://youtu.be/3fwkAvTdZCY

mga




## La blankaj noktoj de Dostojevskij

**SPECIALA OFERTO** pro la 200-a datreveno de Fjodor Dostojevskij (11-a de novembro 1821): dum novembro aĉetu ***Blankaj noktoj*** kun sesona rabato ĉe la Libroservo de UEA: Tio validas nur ĝis la **fino de novembro**, do rapidu!

https://katalogo.uea.org/?inf=6700

## Zamenhoftaga afiŝo

Ni jam montris tion en EKO. Danke al Luis Obando kaj Mariana Evlogieva la afiŝoj estas elŝuteblaj el la reto:

https://espereto.com/informiloj/

Aklaki la titolon "NOVA KOLEKTO: ZAMENHOF-TAGO 2021". Post tio, kiel antaŭe, oni plu vidas la ligilon al ĉiuj afiŝoj en la nubo, la klarigojn pri uzado ktp. **Bonvolu sendi tradukojn al aliaj lingvoj.**

## AVE bonhave – praktika helpo

Ne atendu la decidojn de la pinta kunveno en Glasgovo. Partoprenu rekte en agado por savi la planedon kaj forigi la uzon de dizelo favore al elektraj paneloj. Subtenu la kampanjon de AVE por instalado de elektraj paneloj en la unua afrika universitato, kiu instruas Esperanton. Tiu universitato bezonas ch. 2 500 eŭrojn por havi sistemon kun 2 paneloj kun povumo de 600 W, 12V kaj 220 V alterna kurento, baterio (200 Ah), konvertilo, k.t.p.. Ili forigos la uzadon de dizelo. Elisee Byelongo instruas tie Esperanton. Bonvolu sendi vian financan subtenon al la UEA-konto: **avex-z** kun la indiko 'elektraj paneloj'.

## Sukcesis la Hispana Kongreso de Esperanto

Krom la omaĝo al Lorca, la ĉi-jara Hispana Kongreso de Esperanto prezentis varian programon, kun aktivaĵoj instituciaj, distraj, kulturaj, sciencaj kaj artaj. La evento disvolviĝis en du malsamaj platformoj, kaj estis sekvata sen teknikaj malfacilaĵoj de internacia partoprenantaro. Se vi ne povis ĝin rekte sekvi, granda parto de la programoj estas nun alireblaj en *Youtube* en tiu ĉi ligilo.

Fonto: Hispana Bitbulteno n-ro 76.




**Valora revuo por lernantoj**

- Prezentas mallongajn interesajn artikolojn en nekomplika rigore kontrolita lingvaĵo
- Tutmonda redakcio kun multaj rubrikestoj
- Absolute utila por esperantistoj tra la tuta mondo.

**Mendu nun por 2022!**

**Por mendi, skribu al <ilei.kasisto<ĉe>gmail.com>.**

========= vortoj: 930 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la **17a aŭgusto 2021** (per EKO 2021-34). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

**Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

ilei

**Helpantoj:**

Rob Moerbeek
Gbeglo Koffi
François Lo Jacomo

**ENHAVO**

- Landoj tra Azio
- AMO 80 en Ĉinio
- Libro-oferto de UEA3
- AVE - sunpaneloj
- Juna amiko - subteninda